

Johann Wolfgang von Goethe, Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)	Johann Wolfgang von Goethe, Same tiel <i>tradukita de Richard Schulz</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Egalajo (Noktokanto de migrant) <i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Super montoj regas kviet' <i>tradukita de Poul Thorsen</i>
Über allen Gipfeln Ist Ruh, In allen Wipfeln Spürest du Kaum einen Hauch; Die Vögelein schweigen im Walde. Warte nur, balde Ruhestd du auch.	Super ĉiuj montoj Trankvil', Kaj ĉiuj fontoj Sen babil'; Aŭdas vi ne Birdetan ĉirpon ar- bare. Pensu prepare Pri la pere'!	Super ĉio iĝas Kviet', Kaj ne moviĝas Pro ventet' Iu foli'; Silentas la birdoj ĉirkaue. Atendu – baldaue Ripozos vi.	Super montoj regas kviet', tra l' foliaro nur ventet' spiras kun trem'. Birdoj arbare silen- tas, se vi atendas, pacas vi mem.
...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-356-705 (2013-12-12 22:17:04)

Verfasst am 6./7. September 1780 auf dem Kickelhahn (Gickelhahn) bei Ilmenau (Thüringen), wo Goethe die Verse mit Bleistift an die Bretterwand einer Jagdhütte schrieb. (Anm. d. Hrg.) Goethe verkis tiun ĉi poemon je la 6./7. de Septembro 1780 sur la monto Kickelhahn ĉe Ilmenau en Turingio (Germanio). Tie li skribis la versojn per krajono sur la tabulo-vandon de ĉasista kabano. (rimarkigo de l' eldoninto)

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio.

Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 – †2006-01-30).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/>